

Hermann Löns,  
Edelwild

Ich bin ein freier Wildbretschütz  
Und hab' ein weit Revier,  
So weit die braune Heide geht,  
Gehört das Jagen mir.

So weit der blaue Himmel geht,  
Gehört mir alle Pirsch  
Auf Fuchs und Has' und Haselhuhn,  
Auf Rehbock und auf Hirsch.

Jedoch mein liebstes Edelwild  
Im ganzen Jagdrevier  
Das ist nicht Hirsch, das ist nicht Reh,  
Das ist kein Jagdgetier.

Es ist ein frisches Mägdelein,  
Auf das ich lieber pirsch,  
Viel lieber als auf Has' und Fuchs,  
Auf Rehbock und auf Hirsch.

Und daß es einem andern hört,  
Macht keine Sorge mir,  
Ich bin ein freier Wildbretschütz  
Und hab' ein weit Revier.

...

Hermann Löns,  
Nobla ĉasaĵo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉasist' libera estas mi  
En vasta ĉasadej',  
Havanta ĉaso-raĵton en  
La tuta erikej'.

Laŭplaĉe ĝis la horizont'  
Ĉasadi rajtas mi  
Je cervoj, kapreoloj kaj  
Ĉasbestoj ĉiuj ĉi.

Sed kion pleje ŝatas mi  
En tuta la are',  
Nek estas kapreol' nek cerv',  
Ĉasbeto estas ne.

Ĝi estas freŝa knabinet',  
Je kiu ĉasas mi  
Ol je la cerv' kaj ĉiu best'  
Volonte multe pli.

Kaj ke ne apartenas ĝi  
Al mi, ne ĝenas min.  
Ĉasist' libera estas mi,  
Mi tamen ĉasas ĝin.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26).*

*Arg-623-1258 (2012-10-22 09:32:02)*

*La origina germana-lingva teksto de la poemo troviĝas interalie en <http://www.zeno.org/Literatur/M/L%C3%B6ns,+Hermann/Gedichte/Der+kleine+Rosengarten/Edelwild>.*

*Traduko de la Germana poemo “Edelwild” de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-623-1259 (2012-10-22 18:53:30)*

*Pri la aŭtoro vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann\\_L%C3%B6ns](http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns) kaj <http://www.loens-verband.de/>.*